



Site internet : www.esperanto-angers.fr

Courriel : info@esperanto-angers.fr

Quelques mots

Notre Assemblée générale a été l'occasion de resserrer les liens entre les adhérents, même si nombre d'entre eux n'ont pu se déplacer. Pour que notre mouvement et, à travers lui, l'idée même de l'espéranto, se développe, nous devons nous faire connaître. Profitons du 150^e anniversaire de la naissance de L.L. Zamenhof pour populariser auprès des Angevins cette langue qui nous réunit. L'exposition à la fin de l'année doit être l'objet de tous nos efforts. Nous devons la réussir !

Pierre Jagueneau

Trésors de notre bibliothèque

Zamenhof, médecin, linguiste, humaniste et traducteur.

En cette année du 150^e anniversaire de la naissance de Zamenhof, il convient de consacrer cette petite chronique à son œuvre multiforme et considérable.

Notre bibliothèque vous propose la collection de ses ouvrages, souvent dans leur première édition.

En ce qui concerne les traductions en espéranto faites par Zamenhof, on ne peut qu'être surpris et admiratif par une telle quantité d'écrits produits en plus de son activité médicale.

Les traductions utilisent une langue encore toute jeune mais déjà solidement charpentée par un "Fundamento" intangible.

Citons l'Ancien Testament de la Bible (traduit de l'hébreu), les contes d'Andersen, le "Revizor" de Gogol, "George Dandin" de Molière, "Iphigénie en Tauride" de Goethe, "Les Brigands" de Schiller, "Le Collège" de Cholem Aleikhem, "Marta" de Orzeszko, "Le Rabin de Baharah" de H. Heine.

Zamenhof a aussi laissé une correspondance considérable, des discours, des brochures définissant les bases de l' "Homarismo", projet de plate-forme humaniste pour tous les peuples qui, dans l'esprit de Zamenhof, participait à "l'idée interne" liée à l'espéranto.

Tout cet immense travail intellectuel, dans la première période de l'espéranto, a joué un rôle considérable pour l'évolution et l'enrichissement de la langue internationale, ainsi que pour sa crédibilité.

André Frangeul

Kelkaj vortoj

Nia Ĝenerala Kunveno estis okazo plifirmigi ligojn inter aliĝintoj, eĉ se multaj el ili ne povis veni. Cele pli disvastigi nian movadon, kaj per ĝi, la ideon mem de Esperanto, ni nepre devas nin konatigi ekstere. Ni bone uzu la 150-an naskiĝdatrevenon de L.L. Zamenhof por popularigi, ĉe la Anĝevaro, tiun lingvon kiu nin ligas. Cele al la jarfina ekspozicio ni devas ĉiuj labori. Ni nepre sukcesigu ĝin !

Pierre Jagueneau

Trezoroj de nia biblioteko

Zamenhof, kuracisto, lingvisto, humanisto kaj tradukisto.

Dum ĉi tiu jaro de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, konvenas dediĉi tiun kroniketon al lia verkaro, multforma kaj konsiderinda.

Nia biblioteko proponas al vi la tuton de lia verkaro plejofte per unuaj eldonoj.

Koncerne la tradukaĵojn en Esperanto faritajn de Zamenhof, oni nur povas esti surprizata kaj admirema pri tiom da skribaĵoj produktitaj ekster lia kuracista agado.

Tiuj tradukaĵoj uzas lingvon ankoraŭ tre junan sed jam firme ĉarpentitan pere de la netuŝebla "Fundamento".

Ni citu la Malnovan Testamenton de la Biblio (tradukita el la hebrea lingvo), la rakontojn de Andersen, "La Revizoro" de Gogol, "George Dandin" de Molière, "Ifigenio en Taŭrido" de Goethe, "La Rabis-toj" de Schiller, "La Gimnazio" de Aleikhem, "Marta" de Orzeszko, "La Rabeno de Baĥarah" de H. Heine.

Zamenhof ankaŭ lasis konsiderindajn koresponda-ĵojn, prelegojn kaj broŝurojn, kiuj difinis la bazon de la Homaranismo, projekto de humanisma platformo por ĉiuj popoloj, kiu en la menso de Zamenhof, kontribuis al la "interna ideo" ligita al Esperanto.

Tiu grandega intelekta laboro, en la unua periodo de Esperanto, ludis konsiderindan rolon por la evoluado kaj la riĉigo de la internacia lingvo, kaj ankaŭ por ties kredindeco.

André Frangeul

Les activités

➤ Le 15 décembre 2008, à l'initiative de la délégation polonaise auprès de l'Unesco et avec le soutien de la délégation lituanienne et la collaboration de l'Association mondiale d'espéranto, une cérémonie a eu lieu au siège de l'Unesco à Paris pour célébrer la naissance de L. L. Zamenhof, l'initiateur de l'espéranto.

Deux membres de notre CA étaient présents ainsi que plusieurs amis des autres groupes de la région.

➤ Le 20 décembre 2008, à Beaucouzé, la Municipalité a planté un olivier (symbole de la paix), devant le groupe scolaire Jacques Prévert. Le président y a représenté notre groupe (par ailleurs membre du Collectif du 21-Septembre – journée de la Paix -).

➤ Le 26 février 2009, Assemblée générale de l'Inter-association « Roseraie ». Nous y avons assisté.

➤ Le 7 mars a eu lieu l'Assemblée Générale du CCAE. 22 personnes étaient venues et 34 adhérents sur 53 étaient présents ou représentés. Le compte rendu, trop volumineux pour être annexé à cette feuille, sera envoyé sous forme papier à tout adhérent qui en fera la demande.

➤ Les cours se termineront bientôt, fin avril pour le 2e niveau et fin mai pour les autres.

Aktivajoj

➤ La 15-an de decembro 2008, laŭ iniciato de la pola delegitaro kaj subteno de la litova kaj la apogo de Universala Esperanto-Asocio, Zamenhof estis honorata en la sidejo de UNESKO en Parizo je sia naskiĝtago la 15-an de decembro 2008.

Du komitatanoj el nia grupo ĉeestis kaj ankaŭ pluraj amikoj el aliaj regionaj grupoj.

➤ La 20-an de decembro 2008, en Beaucouzé [Bokuze] urbeto okcident-apuda de Angers, la municipo plantis olivarbon (pac-simbolo), antaŭ la lernejo "Jacques Prévert". Nia prezidanto reprezentis nian grupon (kiu estas membro de la kolektivo "21-a de septembro" – pacotago -).

➤ La 26-an de februaro 2009 okazis la Ĝenerala Kunveno de la asociaro « Roseraie » Ni ĉeestis.

➤ La 7-an de marto okazis la Ĝenerala Kunveno de nia grupo. 22 personoj partoprenis kaj 34 aliĝintoj el 53, ĉu ĉeestis, ĉu estis reprezentitaj. La protokolo, tro longa por esti sendata kun tiu bulteno, estos tuj papere sendita al ĉiu aliĝinto, kiu petos ĝin.

➤ Kursoj baldaŭ finiĝos, april-fine por la 2-a nivelo kaj maj-fine por la aliaj kursoj.



Notu :



En 2009 : 150e anniversaire de la naissance de Zamenhof (1859).
Pour cet important événement, nous organisons une exposition du 24 novembre au 18 décembre avec la collaboration de la Bibliothèque Municipale.
Une commission a pris le dossier en charge, mais nous avons besoin des idées et de l'aide du plus grand nombre possible de nos membres. Merci de vous associer à cette entreprise.



A venir

➤ Du 1er au 3 mai auront lieu à Grésillon, des ateliers créatifs (informatique, traitement photo, atelier d'écriture, reliure, peinture sur objets).

Les stages d'été auront lieu du 4 juillet au 15 août, soit 6 semaines de stage.

Le 1er stage sera plus particulièrement dédié à la paix.

Voir le site : <http://gresillon.org/>

➤ 6 et 7 juin, Fête Bio de Mûrs-Erigné. Nous y participerons pour la deuxième fois et espérons qu'elle sera aussi riche en contacts et rencontres que la première. Nous serons heureux de votre visite.

➤ Le 21 septembre. Cette journée, à l'initiative des

Venontas

➤ De la 1-a ĝis la 3-a de majo en Grezjono, okazos kre-ateleroj (informadiko, fotoprocesoj, verko-atelero, bindaĵo, pentrado sur objektoj).

Someraj staĝoj okazos ekde la 4-a de Julio ĝis la 15-a de Aŭgusto, t.e. 6 staĝo-semajnoj.

La 1-a staĝo estos ĉefe dediĉita al la temo : Paco.

Vidu la retpaĝaron : <http://gresillon.org/>

➤ La 6-an kaj 7-an de junio, "Bio"-festo en Mûrs-Erigné. La duan fojon ni partoprenos kaj esperas, ke ĝi estos tiel riĉa pri kontaktoj kaj renkontoj, kiel la unua. Via vizito plezurigos nin.

➤ La 21-an de septembro. Tiu tago, iniciatita de la

Nations Unies, est destinée, entre autres buts, à favoriser le dialogue entre les citoyens des différentes nations, dans un esprit de curiosité et d'amitié. La journée est organisée à Angers par le Collectif du 21 Septembre auquel participe notre groupe. Réservez cette journée pour nous rejoindre.

➤ En novembre, le Forum des Associations sera organisé.

Les nouvelles du monde

Hongrie

Nous vous recommandons de nouveau un lien fort intéressant sur un groupe de Hongrie :

<http://kiralylajos.extra.hu/>

Amérique du Sud

« Ponto de Esperantujo » de l'autre côté de l'Atlantique :

<http://radioaktiva.esperanto.org.uy/>

Pologne

Il y a 50 ans, le 4 avril, la radio Polonaise lançait un programme quotidien dans la Langue Internationale. Nul ne pouvait prévoir la durée de cette aventure avec la parole et la langue parlée qui confirmait la vivacité de la Langue Internationale Esperanto. Vous pouvez écouter les émissions quotidiennes en espéranto directement depuis notre site :

<http://www.polskieradio.pl/eo/>

Écoutez-nous d'abord puis faites écouter les autres !
D'avance merci !!

Rejoignez la famille des amis de la radiodiffusion espérantophone !

Amicalement et cordialement.

La Rédaction Espéranto de Pola Radio
(extrait du message)

Notre ville jumelée

Notre groupe ami de Haarlem a eu son Assemblée Générale le 14 février.

En plus des réunions régulières à tour de rôle chez des membres, le club a fait une excursion au parc national "De Zandwaaier" à Overveen (près d' Haarlem) et a visité l'exposition consacrée à Hilde, une femme trouvée dans un village d'avant l'époque chrétienne.

Plusieurs membres d'Haarlem ont évidemment participé au Congrès Mondial de Rotterdam.

En mai, le groupe a l'intention d'organiser une promenade dans les dunes.

Remarque personnelle d'un Angevin : Est-ce qu'un membre de notre groupe serait prêt à organiser de telles visites ou promenades (en parlant espéranto évidemment) ?

Unuiĝintaj Nacioj, celas, interalie, faciligi dialogon inter la civitanoj el malsamaj nacioj, en scivolema kaj amika etoso. Tiu tago estas organizata de la kolektivo "21-a de septembro", en kiu nia grupo partoprenas. Rezervu vian tagon por ĉeesti kun ni.

➤ En novembro, la asocio-forumo okazos.

La mondo-novaĵoj

Hungario

Ni refoje rekomendas al vi tre interesan ligan pri Hungaria grupo :

<http://kiralylajos.extra.hu/>

Sudameriko

« Ponto de Esperantujo » aliflanke de Atlantiko :

<http://radioaktiva.esperanto.org.uy/>

Pollando

Antaŭ 50 jaroj, la 4-an de aprilo, la Pola Radio lanĉis la ĉiutagajn programojn en la Internacia Lingvo. Neniu povis antaŭvidi la daŭron de tiu aventuro kun la parola kaj parolata lingvo, kiu konfirmis la vivantecon de la Internacia Lingvo, Esperanto. La ĉiutagajn E-elsendojn vi povas aŭskulti rekte pere de nia paĝaro

<http://www.polskieradio.pl/eo/>

Unuavice aŭskultu nin kaj aŭskultigu aliajn!
Anticipan dankon!!

Aliĝu al la familio de amikoj de la Esperantlingva Radiofonio !

Amike kaj kore.

Esperanto-Redakcio de Pola Radio
(eltiraĵo de la mesaĝo)

Nia ĝemeligita urbo

Nia amika grupo de Haarlem okazigis sian Ĝeneralan Kunvenon la 14-an de Februaro.

Krom regulaj kunvenoj laŭvice ĉe iu grupano, la klubo ekskursis al parko "De Zandwaaier" en Overveen (apud Haarlem) kaj vizitis la ekspozicion pri Hilde, la virino, kiun oni trovis en antaŭ-Krista vilaĝo.

Kompreneble, pluraj Haarlemoj partoprenis la Universalan Kongreson en Roterdamo.

En Majo la grupo intencas organizi promenon en la dunoj.

Persona rimarko de Anĝevano : Ĉu iu grupano de Angers pretus organizi tiajn vizitojn aŭ promenadojn (Esperant-parolante, kompreneble) ?

Omaĝe al grava membro de nia grupo

Fernand Boyet forpasis la 15-an de Decembro 2008 en Angers.

Li longtempe agadis sine de nia grupo, i.a. kiel prezidanto de 1976 ĝis 1993 kaj iĝis Honora Prezidanto de nia grupo.

S-ro Boyet estis "LA" referenco pri Esperanto-lingvo por ĉiuj Anĝevanoj.

Li korektis perkorespondajn kursojn kaj ĝis antaŭ kelkaj jaroj plu instruis en « ECA3 », la poremerita universitato.

Krom en Angers, li multe laboris por Grezijono, la Esperanto-Kulturdomo apud Baugé.

Li aliĝis al UEA en 1949 kaj iĝis dumviva membro en 1969. Li estis fakdelegito pri instruado de scienco

Li naskiĝis en 1921, kaj profesie estis direktoro de la lernejo por instruistoj (École Normale) en Angers.



Notre site internet

Un nouvel hébergement pour le site internet du Centre Culturel Angevin d'Espéranto.

Vous êtes un visiteur assidu de notre site internet !

Vous connaissez par cœur son adresse, ou alors vous avez pris soin de la mettre en signet dans votre navigateur !

Au cours des derniers mois, vous avez donc remarqué que le site a déménagé.

Depuis novembre 2008, nous avons pris la décision de confier le site internet de l'association à un nouvel hébergeur.

Il y a différentes raisons à cela, certaines sont trop techniques pour être développées ici.

Le changement le plus visible concerne notre nouvelle adresse, puisque nous possédons à présent notre propre domaine, « esperanto-angers.fr ».

Ainsi, nos coordonnées officielles deviennent :

- pour accéder à notre site : <http://www.esperanto-angers.fr>
- pour nous contacter par courriel : info@esperanto-angers.fr

Pour le reste, le contenu du site reste le même : vous y retrouverez les articles sur l'association et ses activités, les annonces des événements, les anciens numéros de notre feuille d'information à télécharger.

Guillaume Savaton

Résolution des adhérents

A l'issue de leur assemblée générale, les adhérents du Centre Culturel Angevin d'Espéranto ont adopté la résolution suivante :

On célèbre en 2009 le cent-cinquantième anniversaire de la naissance de Louis-Lazare Zamenhof, initiateur de la langue internationale Esperanto. En 1959, il fut proclamé par l'UNESCO, l'une des grandes personnalités de l'humanité.

Zamenhof eut le mérite de définir les caractéristiques essentielles d'une authentique « langue internationale » :

- puiser ses racines dans des langues existantes ;

Nia retejo

Nova gastiganto por la retejo de la Anĝeva Kulturcentro pri Esperanto

Vi estas ofta vizitanto de nia retejo !

Vi parkere konas ĝian adreson, aŭ vi zorgeme kreis legosignon al ĝi en via retfoliumilo !

En la lastaj monatoj, vi do rimarkis, ke la retejo translokiĝis.

Ekde novembro 2008, ni decidis konfidi nian retejon al nova gastiganto.

Tiun decidon ni faris pro diversaj kialoj, iuj tro teknikaj por klarigi en tiu folio.

La plej videbla ŝanĝo estas nia nova retadreso, ĉar ni nun posedas nian propran domajnon, « esperanto-angers.fr ».

Konsekvence, niaj oficialaj kontaktinformoj nun estas:

- por atingi nian retejon : <http://www.esperanto-angers.fr>
- por kontakti nin per retpoŝto : info@esperanto-angers.fr

La enhavo de la retejo mem ne ŝanĝiĝis: en ĝi vi retrovos artikolojn pri la asocio kaj ĝiaj agadoj, anoncojn pri eventoj, la elŝuteblajn antaŭajn eldonojn de nia informfolio.

Guillaume Savaton

Rezolucio de la membroj

Fine de sia Ĝenerala Kunveno, la membroj de la Kultura Esperanto-Centro de Angers adoptis la jenan rezolucion :

En 2009 oni festas la 150-an datrevenon de la naskiĝo de Louis-Lazare Zamenhof, iniciatinto de la internacia lingvo Esperanto. En 1959, Unesko proklamis lin, unu el la plej grandaj eminentuloj en la homaro.

Zamenhof havis la meriton difini la ĉefajn karakterizaĵojn de aŭtenta "internacia lingvo" :

- ĉerpi siajn radikojn el la ekzistantaj lingvoj ;

- être neutre et équitable pour tous les peuples ;
 - être la plus facile des langues par sa structure « planifiée » ;
 - pouvoir exprimer par sa propre littérature et son expression orale, toute la complexité des sentiments humains.

Les espérantophones angevins demandent aux responsables politiques, aux enseignants, aux médias, de mesurer le danger bien actuel pour la diversité culturelle, du quasi-monopole d'une langue dominante dans les relations internationales.

Ils leur demandent aussi de réfléchir aux immenses avantages qu'aurait la diffusion progressive de l'espéranto (qui fait ses preuves de langue vivante et efficace depuis cent vingt ans !), pour une considérable intensification – au moindre coût – des contacts directs inter-peuples, générateurs de compréhension réciproque.

- esti neŭtrala kaj justa por ĉiuj popoloj ;
 - esti la plej facila lingvo per sia "planita" strukturo ;

- kapabli esprimi per sia propra literaturo kaj sia parol-esprimeblo, la tutan kompleksecon de la homaj sentoj.

La Anĝevaj Esperantistoj petas la politikajn respondeculojn, la instruistojn, la amaskomunikilojn, ekkonscii pri la nuntempa danĝero kontraŭ la kultura diverseco pro la kvazaŭ-monopolo de superreganta lingvo en la internaciaj rilatoj.

Ili petas ilin ankaŭ pripensi pri la grandegaj avantaĝoj, kiujn estigus la iom-post-ioma disvastigado de Esperanto (kiu pruvis sian lingvo-vivantecon kaj -efikecon dum 120 jaroj !), por konsiderinda plifortigo – plej malmultekoste – de la rektaj inter-popolaj kontaktoj, generantoj de reciproka interkompreniĝo.



Nos recettes de cuisine

Lentilles aux carottes

4 PERSONNES. Préparation 15 minutes
 Cuisson : 45 minutes.

Ingrédients :

2 oignons. 2 carottes. thym, persil, sel.
 150 g de lentilles, 4 tomates, 2 cuillerées à soupe d'huile d'olive.
 1\2 litre de bouillon de légumes.

Preparation :

Laver les lentilles. Dans une casserole, faire revenir à l'huile l'oignon émincé et les carottes râpées. Ajouter les lentilles, les tomates pelées et coupées en quartiers, le sel, les herbes et le bouillon de légumes. Couvrir et laisser mijoter 45 minutes environ. Vérifier la cuisson et servir saupoudré de persil haché.

Peut être servi accompagné de sarrasin pour faire un plat complet.

On peut également précuire les lentilles ce qui diminue le temps de cuisson.

BON APPÉTIT !

Monique

Niaj kuiradaj receptoj

Lentoj kun karotoj

KVAR PERSONOJ. Preparado : 15 minutoj
 Kuirado : 45 minutoj.

Ingrediencoj :

2 cepoj, 2 karotoj, timiano, petroselo, salo.
 150 g da lentoj, 4 tomatoj, 2 supkuleraj da oliva oleo.
 Duon-litro da legombuljono.

Preparado :

Lavu la lentojn. En kaserolo, flave subrostu en oliva oleo cepon maldike tranĉitan kaj la raspitajn karotojn, almetu la lentojn, la tomatojn senŝeligitajn kaj pecegitajn, salon, aromherbojn kaj legombuljonon. Kovru kaj kuiretigu dum ĉirkaŭ 45 minutoj. Surŝutetu per hakita petroselo kaj servu.

Eblas servi ĝin kun fagopiro por fari kompletan pladon.

Ankaŭ eblas antaŭ-kuiri la lentojn, kio mallongigas la kuirodaŭron.

BONAN APETITON !

Monique





Ni ludis

<p>N° 7</p> <p>1 KALIFORNIO</p> <p>2 ORATOR - EBR</p> <p>3 NOTARIO - EK</p> <p>4 KM - EKIRI</p> <p>5 SIGNAL</p> <p>6 RAPORT - URO</p> <p>7 ARA - MORSO</p> <p>8 NARIT - ATRI</p> <p>9 TNT - KAPRIC</p> <p>10 OĜOD - DOI</p>	<p>A KONKURANTO</p> <p>B AROM - ARANĜ</p> <p>C LAT - SPARTO</p> <p>Ĉ ITALIO</p> <p>D FOR - GRMTK</p> <p>E ORIENTO - AD</p> <p>F OKA - RAPO</p> <p>G NE - ILUSTRI</p> <p>Ĝ IBER - RORI</p> <p>H ORKIDO - ICO</p>
---	---

Ni ludas

Horizontale :

- 1) Korpostaro (sf) – Duone unikaj !
- 2) Gaja burleskulo (sf) – Lirika poemo (sf).
- 3) Ne volanta paroli – Sporto ludata je 13 aŭ 15 partoprenantoj en ĉiu teamo (sf).
- 4) Moviĝi per piedoj, flugiloj, ... - Komenco de komenco ! - Prepozicio.
- 5) Planta pikilo – Ĉeĥo aŭ ruso (sf).
- 6) Malmulte.
- 7) Metalto – Kivio (sf).
- 8) Brasiko kultivata por sia tubera radiko (sf) – Randa velŝnuro.
- 9) Ŝaŭmigita ovoblanko – Dividilo.
- 10) Tersatelito – Membro.

Vertikale :

- A) La esperantistoj, ekzemple.
- B) Membro – Purigi (sf).
- C) Eligi – Loĝanto en Bjalistoko ! (sf).
- Ĉ) Biblia virina nomo – Konstruinto de la arkeo – Interjekcio.
- D) Uesta parto de Ekvadoro ! - Havi la ĝustan ideon pri la signifo de io (sf).
- E) Planedo – Ĉiuj ejoj kuŝantaj sur la sama nivelo.
- F) Duono de nubo ! - Tiu de la esperantistoj estas verda.
- G) Ĉambrego kie oni montras artaĵojn (sf).
- Ĝ) Havanta altajn moralajn kvalitojn – Piktogramo (sf).
- H) Menskreaĵo (sf) – Surrela veturilo.

N° 8

(sf) : sen finaĵo

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										



Appel :



Ce bulletin vous semble utile, même peut-être nécessaire ? Pourquoi ne participeriez-vous pas à son élaboration ?

Nous recherchons un ou deux volontaires pour en assurer la mise en page, le tirage et l'envoi (par courriel et par la poste). Contactez-nous.



Les membres du Bureau

(2009 – 2010)

La estraranoj

- Président : Pierre Jagueneau - Tél. 02 41 73 17 97
- Vice-président : Jeanik Marolleau - Tél. 02 41 27 30 33
- Secrétaire : Laurent Vignaud - Tél. 02 41 20 19 40
- Secrétaire adjoint : Guillaume Savaton - Tél. 02 41 87 42 53
- Trésorier : Gérard Musset - Tél. 02 41 80 44 34

- Prezidanto
- Vic-prezidanto
- Sekretario
- Vic-sekretario
- Kasisto